# *Kuba prezidento akceptis la guberniestron de Sankt-Peterburgo*



**Foto:@Prezidanteco**

Havano, nov 23 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, akceptis ?i-vendrede Aleksandr D. Belglov, guberniestro de la rusa urbo Sankt-Peterburgo, kiu vizitas  la landon.

En la kunveno, la prezidento emfazis la forton de la rilatoj kaj dankis la prezidenton de Rusio, Vladimir Putin, pro lia sentemo kaj kompreno de la problemoj de la kuba popolo, raportis la Prezidanteco en la socia reto X.

"Vi venis en kompleksa tempo por Kubo kaj tio montras la korinklinon, kiun ni ?iam ricevas de vi," diris Díaz-Canel.

Belglov dankis pro la bonvenigo de la antila ?tatestro, kiun li certigis, ke "estas multe da homa varmo en nia urbo por la kuba popolo".

?i signifis la kontinuecon, kiun li povis aprezi de la ideoj de la historia gvidanto de la Revolucio, Fidel Castro Ruz (1926-2016) en la novaj generacioj.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/370389-kuba-prezidento-akceptis-la-guberniestron-de-sankt-peterburgo

**Radio Habana Cuba**